

BEOGRADA VERDA SIFLO

Jaro III

Beogrado, januaro-aprilo 2008

n-ro 1(5)

Teruraj datoj por serba kulturo en Kosovo

Krom la popolo, en Kosovo estas endanĝerigita ankaŭ la kulturo serba. Albanaj provoj, eĉ sukcesoj, disrabi kaj forbruligi, sakrilegii kaj detruiri ĉion kion prauloj de la serba popolo dum jarcentoj konstruis, havas la celon elpensi novan historion por kvaziŝtato en la serba teritorio.

Ni rememorigas ke ekde la „tomahawk” 1999 jaro, nome dum lastaj naŭ jaroj post la NATO-bombardado, albanaj ekstremistoj en Kosovo detruis pli ol 150 kirkojn kaj monakejojn, kaj 35 dum la albana pogromo en marto 2004. Pluraj centoj da serbaj monumentoj eĉ hodiaŭ estas en danĝero. Tion konfesis ankaŭ UNESCO kaj ĝia Centro por la tutmonda heredaĵo.

La plej terura dato estas la 17-a de februaro ĉi-jare, kiam, subtenitaj de grandaj fortegoj, albanaj separatistoj proklamis sendependecon, kvankam ili estas malmulto koncerne la Serbion.

Temas pri teruraj faktoj kiuj, bedaŭrinde, ŝlimigas demokratiajn atingiĝojn en okcidenta Balkano.

M. Stojanović

Eldonas Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado
Eldonata surpapere kaj sur kompakta disko (CD) kiel Word-dokumento
Prezo: 70 din. unu ekzemplero, 200 din. jarabono (sendokostoj ne
enkalkulitaj, por enlando ĉirkaŭ 45 din por unu ekzemplero),
sendepende ĉu surpapere aŭ sur kompakta disko
Por eksterlando unu ekzemplero 2 €, jarabono 6 € (plus sendokostoj)
Aperas trifoje jare

Ĉefredaktoro: d-ro Miodrag Stojanović, **Redakta komitato:** d-ro
Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa Eremija, Mirjana
Šundeka, Etelka Kiš-Jakupović, Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić,
Slavica Stoilković, Branko Despotović, Dimitrije Janičić, m-ro Gvozden
Sredić, Velibor Simović, Milan Olbina, **Teknika redakto:** Adem Jakupović

Originala poezio

Milivoje Pavlović

Mi enamiĝis

Enamiĝinte mi restas fidela
Ĝis miaj lastaj, vivfinaj momentoj;
Kaj tia amo montriĝas pli bela
Ol ĉiuj amoj kaj ol ĉiuj sentoj.

Mi enamiĝis pasie, tutkore ...
kaj mia amo plenbruste min skuas.
Ĉar la amanto suferas dolore,
Dum la malamo diboĉas kaj bruas.

Amante mi tre volonte oferas
Ĉiun ekspiron, eĉ lastan sangeron
Per arda fajro mia amo flamas.

Ho! Mi ankoraŭ nelonge suferos,
La amo venkos, mi sentas esperon ...
Mi amas ... amas ...
Mondpacon mi amas.



ESTI LA UNUA

En homa vivo,
neniam forgesiĝu:
unua esti
kaj tie resti –
estas sen alternativo,
ĉar en multaj aferoj,
nur premieroj,
mensogoj aŭ veroj,
en rememoro restas
kaj longan vivon festas.

Unuaĵojn ni rememoras
per larmoj priploras
pro tio kio pasas
la unuan ni ĉasas,
gardas kaj diskretas
aliaĵojn – ni ĵetas.

Unua vojaĝo,
travivita avantaĝo,
ricevita kiso,
unua kompromiso,
unua klaso,
unua dirita vorto,
naskiĝtaga torto,
unuaj danco, balo,
unuaj sekreto, skandalo,
memstara aĉeto,
vidita stripo,
malsaniĝo je gripo,
lernita litero,
trinkita biero,
travivita danĝero,
skribita letero,
la plej gravaj restas –
tio estas vero.

Unue mensogi,
unue sola loĝi,
kaŝita cigaredo,

ebriiga bankedo,
ricevita velocipedo
restas en nia posedo.

Unua infano
kaj ĝi en la manoj,
dum infana malsano,
ricevo de unua salajro,
unua grizharo,
unua sola somerumo,
kaŝita tabakfum(ad)o,
perlaborita miliono,
longa pantalono,
ricevita posteno,
ama kunveno
donita floro,
travivita doloro,
unua seniluziiĝo,
batalo por prestiĝo,
unua enamiĝo,
memstara vojaĝo,
aĉetita aŭto,
forta volupto,
perdita virgeco,
stranga apreco,
publika debuto –
estas absoluto
aferoj por memoro
kiujn ni gardas
en propra trezoro.

Poste alvenas
aferoj por forgeso,
de malsano procezo,
stresoj kaj regresoj
fino de sukcesoj.

Originala prozo

Senka Tomić

SOLDATO DE KRISTO

Li vagis kien ajn batalaj ventoj portis lin. Rajdistoj, soldatoj, homoj el pasintaj tempoj, perditaj en kronikoj, en polvo. Tra la vastaj spacoj de iliaj spuroj historio rekonis sin mem kaj la polvon. Kaj ore broditajn monogramojn... Preĝi aŭ peti por kompato estis same. Preĝlibro en la selpoŝoj de ĉiu el ili ankaŭ povis enhavi ian teruran rakonton. Sed- ne enhavis. Sammaniere la animoj fariĝis lezeblaj kaj diafanaj, povaj kaj nevenkeblaj, irante al la celo survoje lasante mortajn.

Foje, deĉevaliĝinte por ripozi, li eniris preĝejon. En tiujn sanktajn lokojn ĉiam alvenadis pasaĝeroj: malesperaj, lacaj, malsanaj... Tie ili paŝadis nudpiede de la malsupra al la supra parto de la templo, surgrimpis la krutaĵojn, la ŝtonajn ŝtuparojn ĝis la preĝejo, eniĝinta en rokon, similan al groto. Li satvidis ilin multajn: tra krepuskoj, ĉe montoj, vojoj kaj solecaj lokoj. Ĉiam ili elspiris odoron de ritaj herboj, trankvilecon kaj - Krucon. La atendado de tiuj odoroj signifis alvenon al la domo. Domo estis io forgesita sed tie estis la Sankta Patro kaj konsolo kaj Redempto. La muroj pistis iun fridon, kiu disŝiriĝadis kiel spado el kupolo leviĝanta super kapo. Ĉiam.

Ĉi-matene sur la longa soleca muro la disverŝitaj koloroj ensorbas la unuajn radiojn de la lumo. La rigardo de la soldato de Kristo, vaka de la nokta lacego, malkovras la sencon de la strekoj antaŭ li. Hufbato kaj heno penetras tra la silento, partoj de preĝkanto alfluas lian buŝon kun rememoraĵoj. Per lanta movo de la mano li tuŝas la frunton. Meze de la penso li haltis, la mano ekmoviĝis de la frunto. Tuŝinte la bruston li mallevis la kapon, la rigardo falis planken kaj li rememoris la bapto-scenon. La armilojn li havis ankoraŭ ĉemane. Atako, rebatoj, rajdadoj, tentoj. La menso ekkirliĝis. Konfeson li devis lasi por poste...

Lerte pentrita ikono konturis la tablon je kiu Kristo kaj Dipatrino manĝis. Altiris lian atenton la ardeco de la koloroj, la klareco de la figuroj. Kaj kiam lia rigardo ekvagis tra la ejo, sur la kontraŭa muro li ekvidis iun figuron, sindetenan en movo kaj sen surskribo. Pasis momento, kaj li rekonis SIAN vizaĝon!

Vakskandeloj eterne jam brulis. Ĉu eblas? Ĉu tio estas iluzio, laco, tento, malsana menso, eble? La seriozaj vizaĝoj de sanktuloj certe ne povis esti tiu tento kaj Li daŭre staris tie.

La figuro sur la muro estis milda. Sen aŭreolo, sed sankteca. La manoj alportis al la vizaĝo la saman spiron de kompatemo. Li ekrigardis tiujn samajn trajtojn. Sendube. Sed ĉu tio estis soldata vizaĝo, senkompata, oferopreta? Ekfulmis sango! Surfrunte, surmane, en saketo, en la ventro, ĉirkaŭ la kolo! Ektagiĝis.

Buŝtuko! Li rekonis ĝin en tiu rigida mano sur la muro. Estis ĝi la sama per kiu Kristo forviŝis sian vizaĝon. La pia vizaĝo vekis voĉojn de dubo. Kaj li ankoraŭ ne retiriĝis kaj sentis fridon de la ŝtono, li sentis ke la figuro enfluis lin.



HRISTOV VOJNIK

Lutao je kud su ga god ratni vihuri nosili. Jahači, ratnici, ljudi iz prošlih vremena, zagubljeni u hronikama, u prašini. Niz široka prostranstva njihovih tragova istorija je prepoznala sebe i prašinu. I zlatom vezene monograme... Moliti se ili moliti za milost beše isto. Molitvenik u bisagama svakog od njih mogao je sadržati i neku užasnu priču. Ali - nije. Tako su i duše postajale tanke i prozirne, moćne i nepobedive a tela padala po zemlji Hristovih koraka.

Jednom, sjahavši da se odmori, svratio je u neku crkvu. U ta osvećena mesta svagda su stizali putnici: nesrećni, umorni, bolesni, svaki za sebe, sa mislima čuvara. Pobožno idu bosu iz donjeg u gornji deo hrama, penju se uz strmine, uz kamene stepenice do ove crkve uvučene u stenu, nalik na pećinu. Mnogih se nagledao kroz sumrake i brda, kraj puteva i na osami. Uvek u njima disale su obredne trave, spokoj i - Krst. Iščekivanje tih mirisa značilo je prići domu. Dom beše nešto zaboravljeno ali tu je bio Sveti Otac i uteha i Izbavljenje. Zidovi su drobili nekom zimom. Izbijala je kao mač iz kupole koja se dizala nad glavom. Uvek.

Ovog jutra na dugom, samotnom zidu razlivene boje primaju u sebe prve zrake svetlosti. Pogled Hristovog vojnika ispražnjenog umorom noći otkriva smislenost crta pred sobom. Topot i rzanje prodiru kroz tišinu, delovi crkvenog napeva naviru naizust, uz sećanja. Laganim pokretom ruke dodiruje čelo. Usred misli zastade, ruka je lagano krenula dalje. Dodirnuvši grudi pognu glavu, pogled pade na pod i tad se priseti scene krštenja. Oružje mu beše još pri ruci. Napad, odbrane, jahanja, iskušenja. Um se zavitla. Ispoved je morao da ostavi za kasnije...

Vešto oslikana ikona prikazivala je trpezu za kojom su Hrist i Bogorodica obedovali. Privuče mu pažnju jarkost boja, jasnoća lika. A kad mu pogled krenu dalje - tamo, na suprotnom zidu, on ugleda neki lik, uzdržan u pokretu i bez natpisa. Potraja tren i on prepozna SVOJE lice!

Voštanice su večnost već gorele. Zar je moguće? Je li to opsena, umor, iskušenje, bolni um, možda? Ozbiljna lica svetaca teško da su mogla biti to iskušenje a On još je uvek stajao tamo.

Lik na zidu beše blag. Bez oreola ali svetački. Ruke su prinobile licu isti dah milosrđa. Zagleda se u iste, jasne crte lica. Nema sumnje, ali da li je to bilo lice ratnika, nemilosrdnog, spremnog na žrtvu? Bljesnu: krv! Na čelu, rukama, u torbi, utrobi, oko vrata! Razdanjivalo se.

Ubrus! Prepoznao je u toj ukočenoj ruci na zidu. Bio je to onaj kojim je Isus obrisao svoje lice. Blaženo lice budilo je glasove sumnje. I još nije odstupio i osetio hladnoću kamena znao je da se lik slio u njega.

Tradukoј

Добрица Ћосић

ПРИЈАТЕЉИ

НЕНАД - НЕША МИХАЈЛОВИЋ, ВИНОГРАДАР-ИНТЕЛЕКТУАЛАЦ

Интелектуалцем се у српском друштву сматра човек с високим образовањем. Та се титула стиче факултетском дипломом, доноси јавни углед, друштвени значај, храни таштину. Међутим, познајем професоре универзитета који су само специјализовани стручњаци, а не продуховљени људи; а познавао сам и познајем земљораднике и занатлије који су интелектуалци, јер умно расуђују о стварности и појавама и умеју апстрактно да мисле.

У мом селу Великој Дренови били су такви Беља Ћосић, Влада Радић, Ђола Мутавџић, Радица Чуљић; у Страгарима - Тила Јовановић; у Коњуху - Драгиша Лукић... Набрајам само оне сељаке с којима сам сарађивао на јавним пословима и дружио се у завичајним доколицама. Сви су они имали понеко изразито умно својство, своју животну филозофију, идеологију и морал, што их је одликовало, чинило познатим и уваженим. Били су то људи с којима се могло и морало да умује, разборито расуђује и одговорно суди; они су о животу и смрти, о човеку и народу, о свету и будућности, имали своје, лично мишљење; они су имали способност за анализу и синтезу; они су умели апстрактно да мисле; они су у већини били скептици и песимисти у погледу на свет. Међу њима је било и „правих филозофа“.

Најоригиналнији је био Влада Радић, кога је професор Воја Ј. Ђурић назвао „моравски Сократ“. Ућутан и увек замишљен, Влада је био у свему песимист, као да је студирао Шопенхауера и ишчитавао Сиорана. Говорио је у сентенцама, згуснуто и метафорично; говорио је само кад треба и мора. На надгробном споменику његовог оца, по жељи покојника, стоји натпис: „Миган-Мица Радић рођен 1873. умро

1939. није живео ич." Једном сам га упитао: „Јеси ли, Владо, смислио шта ће да пише на твом надгробном споменику?" „На мом гробу неће бити ни споменик. Не знам зашто би било важно да се зна да сам ја живео."

Беља Ћосић је био богат, просвећен и уљудан сељак; у разговорима са многим занимале су га теме којима се баве социологија и антропологија. Презирао је новине због лажљивости. Комунистичке функционере је сматрао незналицама и тврдио да Србију неће да упропасте комунисти него незналице.

Тила Јовановић, најбогатији сељак у Страгарима, био је левичар, сељачки идеолог. Имао је своје етнопсихолошке погледе на Србе; проучавао је Дворниковићеву Карактерологију Југословена и делио Србе на ратаре и сточаре, дајући предност ратарима. Говорио је разборито, самоуверено, а дивио се Совјетској Русији и научницима. Умовао је и о судбини света. Имао је храбрости за све људско.

Ђола Мутавџић, столар и сељак, био је велики радозналац и поштовалац учености. Мучило га је људско несавршенство и пропадање села. Сумњао је у бољу будућност српског народа. Оштро је разликовао људе од идеја. Говорио је елоквентно и убедљиво. Волео је старе куће и сеоске старине; испољавао је одбојност према свему урбаном и техничком, осим према машини за прање веша, коју је сматрао најзначајнијим изумом 20. века, јер је ослободила женски род понижавајућег посла.

Драгиша Лукић био је богат сељак, левичар, страсни политичар. Проучавао је Марксов *Капитал*, Енгелсов *Антидиринг* и Лењинова дела. Идеолог аграрног социјализма и модернизације пољопривреде. Проучавао је Тацита и читао биографије великих историјских личности. Кад год бисмо се срели, он би ми испричао понеку анегдоту о некој знаменитој личности и цитирао њихове мисли.

Радица Чуљић био је сељак средњег имовног стања и велики читач. Био је обузет политичким темама, историјом комунистичког покрета и Коминтерном. Био је убеђени антијугословен; шездесетих година схватио је суштину српског питања. Кад год бисмо се срели, имао је тему о којој је размишљао. Чим би чуо да сам дошао код мајке и брата, долазио је са припремљеним питањима и захтевао одговоре. Није подносио трећег у разговору: „С једним човеком се разговара. С двојицом и тројицом се свађа."

Да не набрајам све сељаке интелектуалце које сам познавао. Посебно помињем Милана Радића учитеља у Великој Дренови, сада пензионера, а мисаоног интелектуалца и писца, нажалост, коаутора само једне књиге: *Основна школа у Великој Дренови*. У тој хроници о школи и селу, Милан Радић је написао биографије најугледнијих сељака и грађана Велике Дренице. Те биографије су изванредни реалистички портрети које одликује луцидност у запажању карактерних својстава и раскошан језик. Свој књижевни дар Милан Радић потврђује и у говорништву; сваки пригодни наступ поетском речју претвара у свечаност. А неће да пише; има преча посла у винограду, башти, прпоришту. Задужио ме је пријатељском оданошћу у времену када сам у завичају био бојкотован као „непријатељ” Партије и социјализма.

Један од најзанимљивијих сељака из мог завичаја је мој пријатељ Ненад - Неша Михајловић из села Мијајловца, у близини Трстеника.

Он је виноградар који има библиотеку од пет хиљада књига. Он је најначитанији сељак кога сам упознао, с којим разговарам о књигама и књижевницима. „Има много великих писаца, а само је један Достојевски”, тврди Неша. Његовој умној радозналости и страсти за сазнањем и дивим се и чудим. Јер знам колико послова има у великом винограду, на њиви, у бачвари, и то послова који се не одлажу. Не знаш колико је Срба прочитало сабрана дела Достојевског, а знам да их у својој библиотеци има Неша, сељак из Мијајловца, и да их је прочитао; неке књиге и више пута. А уз књиге које је написао Достојевски прочитао је он и оно што о Достојевском мисле Берђајев, Мерешковски, Шестов, Бахтин, Цвајг, Драган Недељковић, Никола Милошевић, Јустин Поповић, Џорџ Стејнер, Милисав Бабовић. Нисам га питао да ли је прочитао и књигу Миливоја Јовановића, коју сам му препоручио. Пре неки дан ми је рекао да му се више допада Цвајгова књига о Достојевском и Толстоју од Стејнерове.

Ненад Михајловић је ликом и говором типичан моравски сељак, али му је понашање господски уљудно и старински смерно. Не изговара ружне речи; подсећа на монаха. Он је крвопилан радник; руке су му као земљоделске алатке; лице му је изборано од рада на сунцу, киши и ветру, али и од бриге да неће стићи све послове у винограду да позавршава, нове књиге да прочита, на предавања и књижевне вечери да оде у Краљево, Врњачку Бању,

Трстеник, Крушевац, а када Драган Недељковић - „Професор“ и ја говоримо у Манасији и Београду, он стигне са својом дружином да чује шта смо рекли и потом успут до Трстеника и Мијајловца то да препричава. По одећи му се не препознају завичај, занимање, имовно стање; одећа му служи да се заштити од хладноће, кише и ветра, а не за представљање. Устаје у свитање, леже рано, успаван умором и књигом. Као виноградар и земљоделац, зими чита највише. Новине су му празне и досадне. Вести чује од комшија и довољне су му да буде забринут за судбину народа коме језиком и душом припада. Телевизију слуша само кад се „нешто опасно догађа.“ На власт не гледа партијски, власт критикује само због лоших закона; људе на власти због непоштовања закона. Не припада ниједној странци. Човек му је изнад идеја, функција, титула; он поштује само људе од знања и уметнике. Он је сељак који не мрзи град, али у њему никад не би живео. Град не цени по хотелима и кафанама, него по културним установама и ствараоцима. Неша је удовац, без деце. Због женине смрти је дуго патио и није је испатио. Нисам уверен да је срећан човек, а знам да је најнесрећнији кад град убије виноград. Јер он живи за виноград, књиге и пријатеље. Он је интровертан, духован и етичан човек; није видно религиозан, али није ни атеист. Знам да га Достојевски збуњује са Христом. Он је благородан и душеван; светачки моралан и правдољубив, топао, добар човек. Хвали се само виноградом, грожђем и вином. Од савременика највише поштује патријарха Павла; од интелектуалаца Драгана Недељковића - „Професора“, који му импонује знањем, просветитељским идејама и присним односом са људима. А и Драган Недељковић воли и поштује Нешу, можда најдушевније од свих својих пријатеља.

Неша Михајловић не импресионира наступом; он је бољи резач, прскач и подрумар но приповедач. Он воли да слуша, а не да прича и приказује знање. И кад о нечем прича, оскудно прича, али доказује да више разуме но што уме да каже. Неша је у чину, делу, односу, а не у речима. Он је хабитусом земљоделац: човек њиве и винограда; лозе и кукуруза; воћке и стоке. Он није конзервативан ни у чему, али није ни помодар, чему су склони моји Дреновци и Медвеђани. Аутомобилом се служи да заврши посао, да доведе хемикалије за прскање винограда, да одвезе вино, да стигне на Професорово предавање, на симпозијум у Трстеник и Крушевац, на књижевно вече у Врњачкој Бањи и било ком западноморавском

граду. За те културне догађаје он има дружину љубитеља знања и књижевне уметности: Милана Радића, учитеља из Велике Дренове, Божу Петровића, инжењера, и Верољуба Вукашиновића, одличног лирског песника из Трстеника, Голу Вукадиновића, сељака-радника из Мијајловца, Драгана Стајића сељака из Медвеђе, с којима аутомобилом или комбијем путује на предавања и књижевне вечери. Пријатељи су му они који пишу књиге и који воле књиге. Он другује с онима с којима може о књигама, предавањима и књижевним вечерима да разговара. У Београду је најдуже у дому Владанке и Драгана Недељковића, а воли да разговара са Никшом Стипчевићем, Василијем Крестићем, Мирославом Егерићем... Кад год доведе вино у Београд, одлази у књижару да купи неку књигу; онда редом обиђе пријатеље да чује новости из културе и Академије и да нам раздели по балонче вина. Са многим не разговара о политици и политичарима, него о писцима и новим књигама које је прочитао и које треба да прочита. Да завршим запис о највећем читачу у сељачком народу око Морава и најбољем познаваоцу Достојевског у моравском човечанству. То ми је пријатељ којим се поносим и који ми одржава пламичак вере да треба писати књиге све док постоји читалац какав је Ненад - Неша Михајловић.

9. август 2002.



AMIKOJ

Nenad – Neŝa Mihajloviĉ, vinberkultivisto kaj intelektulo

Intelektulo en la serba socio estas konsiderata homo kun alta instruiteco. Tiun titolon oni akiras per fakultata diplomo, alportanta publikan reputacion, socian gravecon, nutrante vanton. Sed mi konas universitatajn profesorojn kiuj estas nur specialigitaj fakuloj, kaj ne spiritigitaj homoj; aliflanke mi konis kaj konas terkulturistojn kaj metiistojn kiuj estas intelektuloj, ĉar ili mense rezonadas pri la realeco kaj pri la fenomenoj, scipovante pensi abstrakte.

En mia vilaĝo Velika Drenova tiaj estis Belja Ĉosiĉ, Vlada Radiĉ, Ĝola Mutavĝiĉ, Radica Ĉuljiĉ en Stragari – Tila Jovanoviĉ – en Konjuh, Dragiŝa Lukiĉ. Mi citadas nur tiujn kamparanojn kun kiuj mi kunlaboris publike kaj amikadis dum naskiĝloka neokupiteco. Ĉiuj ili havis iun eksplicite mensan kvaliton, sian vivofilosofion, ideologion kaj moralon, kio karakterizis ilin, konatigis kaj estimigis. Estis ili homoj kun kiuj oni povis kaj devis cerbumadi, sagace rezonadi kaj respondece juĝi; ili havis sian personan opinion pri vivo kaj morto, pri homo kaj popolo, pri la mondo kaj estonteco; ili havis kapablecon por analizo kaj sintezo, ili povis pensi abstrakte; ili estis plej parte skeptikoj kaj pesimistoj koncerne la mondo. Inter ili troviĝis eĉ "veraj filizojf".

La plej originala estis Vlada Radiĉ, kiun profesoro Voja J. Ĝuriĉ titolis "Moravana Sokrato". Silenta kaj ĉiam pensema, Vlada estis en ĉio pesimisto, kvazaŭ li estus studinta Ŝopenhauron kaj finleginta Sioranon. Li parolis per sentencoj, densigite kaj metafore; li parolis nur kiam tio estis bezone kaj devige. Sur la tomboŝtono de lia patro, laŭ dezire de la forpasinto, estas engravurita: "Milan – Miĝa Radiĉ naskiĝis en 1873, mortis en 1939, tute ne vivis." Foje mi demandis lin: "Ĉu vi, Vlado, elpensis kio estos skribita sur via tomboŝtono?" "Sur mia tomboŝtono tute ne estos memorŝtono. Mi ne scias kiel gravus ke oni sciu ke mi vivis."

Belja Ĉosiĉ estis riĉa, klera kaj ĝentila kamparano; dum interparoloj kun mi li interesis temoj pri kiuj okupiĝas sociologio kaj antropologio. Li malŝatis gazetojn pro ilia mensogemo. Komunistajn

funkciulojn li konsideri nesciuloj, kaj asertis ke Serbion ne ruiniĝos komunistoj, sed nesciuloj.

Tila Jovanoviĉ, la plej riĉa kamparano en Stragari, estis maldekstrulo, vilaĝa ideologo. Li havis siajn etnopsihologiajn vidpunktojn koncerne la serbojn; li studadis *La karakterologion de la Jugoslavo* de Dvornikoviĉ, dividis la serbojn en terkulturistojn kaj brutbredistojn, preferante la terkulturistojn. Li parolis prudente kaj memkonvinkinte, li miris Sovetan Rusion kaj scienculojn. Li cerbumadis pri la sorto de l' mondo. Li havis kuraĝon por ĉio homa. Ĝola Mutavĝiĉ, lignaĵisto kaj kamparano estis granda scivolemulo kaj estimanto de instruiteco. Turmentis lin la homa malperfekteco kaj la detruigo de la vilaĝo. Li dubis pri la pli bona estonteco de la popolo serba. Li strikte diferencis homojn de ideoj. Li parolis elokvente kaj konvinkige. Li ŝatis malnovajn domojn kaj vilaĝan antikvecojn; esprimis repuŝvorton kontraŭ ĉio urba kaj teknika, krom la lavomaŝino, kiun li konsideris la plej gravan inventaĵon de la dudeka jarcento, ĉar ĝi liberigis la virinan genron de humiliganta laboro.

Dragiŝa Lukiĉ estis riĉa kamparano, maldekstrulo, pasia politikisto. Li studadis *Kapitalon* de Markso, Antidiringon de Engels kaj la verkon de Lenin. Ideologo de socialismo kaj modernigo de agrikulturo. Li studadis Taciton kaj legis biografiojn de grandaj historiaj eminentuloj. Ĉiam kiam ni renkontiĝis li rakontis al mi anegdotojn pri iu elstara persono kaj citis liajn pensojn.

Radica Ĉuljiĉ estis mezriĉa kamparano kaj granda leganto. Li estis absorbita de politikaj temoj de historio de komunisma movado kaj de Kominterno. Estis konvinkita kontraŭjugoslavo, dum la sesdekaj jaroj li perceptis la esencon de la serba demando. Ĉiam kiam ni renkontiĝis, li havis temon pri kiu li estis pripensita. Tuj post li aŭdis ke mi estis veninta ĉe mia patrino kaj frato, li venis kun preparitaj demandoj kaj postulis respondojn. Li ne suportis trian personon dum interparolado: "Oni interparolas kun unu homo. Kun du kaj tri oni kverelas."

Ke mi ne menciu laŭvice ĉiujn kamparanojn intelektulojn kiujn mi konis. Aparte mi mencias instruiston en Velika Drenova, Milan Radiĉ, nun pensiulon kaj ideoriĉan intelektulon kaj verkiston, bedaŭrinde kunaŭtoron de nur unu libro: *Elementa lernejo en Velika Drenova*. En ĉi tiu kroniko pri la vilaĝa lernejo Milan Radiĉ verkis biografiojn de la plej eminentaj kamparanoj kaj civitanoj de Velika Drenova. Tiuj biografioj estas eksterordinaraj realismaj portretoj kiujn karakterizas lucideco en rimarkado de karakteraj kvalitoj kaj superabunda esprimmaniero. Sian

literaturan talenton Milan Radić konfirmadis ankaŭ en retoriko; ĉiun laŭcirkostancan aperon, per poeta parolo li transformas en solenaĵon. Kaj li ne volas verki, li havas pli urĝan aferon en vinberejo en la ĝardeno, en la plantkulturejo. Li ŝuldigis min de danko per amika fideleco dum la tempo kiam mi estis bojkotita en mia naskiĝregiono kiel "malamiko" de la Partio kaj de la socialismo.

Unu el la plej interesaj kamparanoj de mia naskiĝregiono estas mia amiko Nenad-Neša Mihajlović el la vilaĝo Mijajlovac proksime al Trstenik.

Li estas vinberkulturisto kiu havas bibliotekon de kvin mil libroj. Li estas la plej multleginta kamparano kiujn mi ekkonis, kun kiu mi interparolis pri libroj kaj pri literaturoj. "Ekzistas multaj grandaj verkistoj, sed nur unu estas Dostojevski", asertas Neša. Mi kaj miras lian mensan scivolemon, lian pasion por eksciado, kaj estas surprizita per tio. Ĉar mi scias kiom da laboro li havas en la granda vinberejo sur la kampo, en la barelfarejo, kaj tiuj estas neprokrasteblaj laboroj. Mi ne scias kiom da serboj finlegis la kolektitan verkaron de Dostojevski, sed mi scias ke ĝin havas en sia biblioteko Neša kamparano en Mijajlovac, kaj ke li finlegis la librojn, kelkajn eĉ plurfoje. Kaj krom la libroj kiujn verkis Dostojevski, li legis ankaŭ tion kion pri Dostojevski opinias Berĝajev, Mereŝkovski, Ŝestov, Bahtin, Cvajg, Dragan Nedeljković, Nikola Miloŝević, Justin Popović, Ĝorĝ Ŝtojner, Milisav Babović. Mi ne demandis lin ĉu li legis ankaŭ la libron de Milivoje Jovanović, kiun mi proponis al li. Antaŭ nelonge li diris al mi ke pli plaĉas al li la libro de Cvajg pri Dostojevski kaj Tolstoj, ol tiu de Ŝtojner.

Nenad Mihajlović estas laŭ aspekto kaj parolo tipa moravregiona kamparano, sed lia konduto estas sinjorece ĝentila kaj antiktempe modesta. Li ne elparolas malbelajn vortojn, similas al monako. Li estas sin neŝparema laboristo; liaj manoj similas al terkulturaj iloj; la vizaĝo estas sulkoplana pro laboro sub suno, pluvo kaj vento, sed ankaŭ pro zorgo ke li ne sukcesos fini ĉiujn laborojn en la vinberejo, finlegi novajn librojn, foriri al prelegoj kaj literaturaj vesperoj en Kraljevo, Vrnjačka Banja, Trstenik, Kruŝevac, kaj kiam Dragan Nedeljković – "la profesoro" kaj mi estas prelegantaj en Manasija kaj Beogrado, alveni kun la komparanoj aŭdi kion ni diris, kaj poste dumvoje ĝis Trstenik kaj Mijajlovac tion rerakonti. Laŭ lia vestaĵo ne rekoneblas lia regiono, metio, havaĵstato, vestaĵo servas lin nur por protektiĝi de malvarmo, pluvo kaj vento, sed ne por prezentado. Li leviĝas aurore, kuŝiĝas frue, endormigata per laco kaj libro. Estante vinberisto kaj terkulturisto, li

plejmulte legadas vintre. Gazetoj estas al li vanaj kaj tedaj. Novaĵojn li aŭdas de la najbaroj, kaj tio sufiĉas por ke li estu zorgoplena pro la sorto de l' popolo al kiu li apartenas per lingvo kaj animo. Televidon li aŭskultas nur kiam "okaziĝas io danĝera". Registaron li ne konsideras el partia vidpunkto, li kritikis la registaron nur pro malbonaj leĝoj; la regantajn homojn pro nerespektado de la leĝoj. Li apartenas al neniŭ partio. Homo estas al li super ideoj, funkcioj, titoloj; li estimas nur homojn sciantojn kaj artistojn. Li estas vilaĝano kiu ne malamas la urbon, sed li neniam vivus en ĝi. Li ne taksas la urbon laŭ hoteloj kaj kafejoj, sed laŭ kulturaj institucioj kaj kreantoj. Neŝa estas vidvo sen infanoj. Pro la morto de sia edzino li longe suferis kaj ne finsuferis. Mi ne certas ĉu li estas feliĉa homo, sed scias ke li estas plej malfeliĉa kiam hajlo detruas la vinberejon. Ĉar li vivas por la vinberejo, por la libroj kaj la amikoj. Li estas introvertita, spirita kaj etika homo; ne estas religia, sed tamen ne ateisma. Mi scias ke Dostojevski konfuzigas lin kun Kristo. Li estas nobla, amplena, sanktule morala kaj justecon amanta, varma, bona homo. Fanfaronas nur pri vinberĝardeno, vinbero kaj vino. Inter la nuntempuloj li plej estimas patriarkon Pavlon, inter intelektuloj Draganon Nedeljkoviĉ – "la profesoron", kiu imponas al li per sia scio, klerigistaj ideoj kaj familiara kontakto kun homoj. Ankaŭ Dragan Nedeljkoviĉ amas kaj estimas Neŝon, eble plej varme ol ĉiujn siajn amikojn.

Neŝa Mihajloviĉ ne impresionigas per sia apero, estas li pli bona tondisto, ŝprucisto, vinkelisto ol rakontisto. Li ŝatas aŭskulti, sed ne paroladi kaj montri sian scion. Kaj kiam li pri io parolas, li ŝpareme parolas, sed pruvas ke li pli komprenas ol, scipovas esprimi. Neŝa distingiĝas per ago, faraĵo, kontakto, ne per vortoj. Laŭ sinteno li estas terkulturisto: homo de kampo kaj vinberejo; de vito kaj maizo; de frutarbo kaj bruto. Li ne estas konservativulo je io, sed ankaŭ ne moderna, al kio kliniĝas multaj Drenovanoj kaj Medveĝanoj. Aŭtomobilon li uzas por laboro, alporti kemiaĵojn por ŝpruci la vinberon, por elveturigi vinon, por alveni al la prelego de Profesoro, al simpozio en Trstenik kaj Kruŝevac, al literatura vespero en Vrnjaĉka Banja aŭ en iu ajn okcidentmorava urbo. Por tiuj kulturaj okazintaĵoj li havas kompanion de scio– kaj literaturartamantoj: tiuj estas Milan Radiĉ, instruisto el Velika Drenova, Boĵa Petroviĉ, inĝeniero kaj Veroljub Vukaŝinoviĉ, bonega lirika poeto el Trstenik, Ĝola Vukadinoviĉ, kamparano-laboristo el Mijajlovac, Dragan Stajiĉ, kamparano el Medveĝa, kun kiuj li per aŭtomobilo aŭ kombio vojaĝas al prelegoj kaj literaturaj vesperoj. Amikoj liaj estas tiuj kiuj verkas kaj amas librojn, prelegojn kaj literaturajn vesperojn. En Beogrado

plej longe li restadas en la hejmo de Vladanka kaj Dragan Nedeljkoviĉ, kaj li ŝatas konversacii kun Nikŝa Stipĉeviĉ, Vasilije Krestiĉ, Miroslav Egeriĉ... Ĉiam kiam li alveturas vinon al Beograd, li iras en librovendejon por aĉeti iun libron; poste li laŭvice vizitadas aliajn amikojn por aŭdi novaĵojn el kulturo kaj el la Akademio, kaj por disdoni al ili po unu korboboteleton da vino. Kun mi li ne parolas pri politiko kaj pri politikistoj, sed pri verkistoj kaj novaj libroj kiujn li legis kaj kiuj estas legotaj.

Ke mi finu la notojn pri la plej granda leganto de la kamparana popolo ĉirkaŭ Moravo kaj pri la plej bona konanto de Dostojevski inter la moravregiona homaro. Li estas mia amiko pri kiu mi fieras kaj kiu reflektas al mi flameton de fido ke endas verki librojn ĝis kiam ekzistas leganto kiel Nenad-Neŝa Mihajloviĉ.

La 9-a de aŭgusto 2002

(El la libro de Dobrica Ĉosiĉ "Amikoj" esperantigis Agnesa Eremija)



Simo Matavulj (1852-1908)

BAKONJA FRAT'-BRNE (Bakonja fra-Brne)

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

(kvina parto)

– Kial ja vi faris tiujn grandajn okulaĉojn je mi!? Ĉu mi ne rajtas menciadi mian infanon? Hontu vi! Ĉar vi ja kvazaŭ bedaŭrus ke viaj konjektoj ne plenumiĝis! Dio ja tion ne permesos, ne, ne, ne, se vi eĉ kadukiĝos pro malico, pro...

Iu ekfrapis al la pordo.

– Tio ree estas tiu vostkurba Controna, lepra sorĉistino. Ŝi pensas ke ŝi ankaŭ ĉi-vespere senpage ebriiĝos! Vi ja ne ebriiĝos, Controna, se eĉ Kadukulo estus mortinta.

– Ne parolu tiel, kristanino! admonis ŝin la vilaĝestro.

Denove oni aŭdis frapadon.

– Iru, Kurbulinaĉo, malfermu, diablo ŝin portu.

Je ilia granda ekmiro eniris Korpulentulo.

Korpulentulo, vizaĝpala, kotmalpura ĝisgenue, kun la pluvŝirmilo enmane, kaj la bunta saketo surŝultre. Sidiĝinte, li kristsalutis, kaj depreninte la ĉapon li ekskuis ĝin je la genuo, tiel ke la gutoj elŝprucis je ĉiuj flankoj...

– Ho, Dio!... Dio!... penpene ekparolis la patrino. Kion mi pekis al vi, stranga Dio, por ke vi min ĉi tiel punu!!? Kion di...ros nun ĉi ti...uj ni...aj mal...u...loj! Ho! ho! ho!

Tiam ekparolemis ankaŭ la estra lango.

– Ho, malfeliĉa infano, tondro vin mortigu!... Mi sciis, sciis!...

Ventregulo, Kurbulino, Vitriolo kaj eĉ Kadukulo, kiu ĝuste tiam vekiĝis, eksekvis la gepatrojn, kaj subite ekestis plorado kaj lamentado en la domo de Hirtulo.

Korpulentulo saltis.

– Ĉesigu... mi venis porafere!

– Kiel porafere, tondro vin mortigu! – diris la estro.

– Mi diras al vi: porafere! Alvenigu tuj Kenjon Murmurulidon

– Alvenigu Kenjo-n, rediras mi. Diru al li, ke tio estas lia afero kaj lia utilo, sed atentu, por ke ne aŭdu vin lia paĉjo.

Hirtulo ekgapis, kaj la edzino puŝis lin.

– Iru, kial vi hezitas, kvazaŭ nia knabo ne scius kion li parolas! Ĉu ja vi ne vidas, ke tio estas komizio de la monako!

La estro, ekfrotinte la okulojn per la manplato, prenis griaĵbulon kaj eliris.

– Do, ili vin ne forpelis, animo patrino, koro patrino? demandas Vespulino, kizante la vangojn kaj kolon de Korpulentulo. Vi estas ĝuste sendita? Kaj ĝuste al Kenjo, lepra Kenjo? Kio povas esti tio?

– Mi petas vin, panjo, kio ajn estu, forigu la infanojn, ĉar mi estas malsata! diris Korpulentulo, eltiris el la saketo macaĵon kaj fromaĵon kaj ekmanĝis.

La patrino malproksimigis la infanojn rakontonte al li kio okazis al Kadukulo.

– Kaj tion la onklino Controna donacis al li. Neniu alia ol ŝi!

Je tio Korpulentulo leviĝis, kisis la fraton, poste revenis al la antaŭa loko. Kaj ŝi aliĝis al la angulo, komencante mallaŭte:

– Nu ĉu vi volas diri al patrino, kio okazas?

– Vi ja aŭdos tuj post reveno de paĉjo.

– En ordo, sed mi emas konsili vin. Sed, tamen, faru kiel vi scias. Ĉu vi volas ke mi vin senŝuigu? Ne, vi diras. Kaj vi, je ĉi-vetero tien - reen! Frat'-Trogulo estas ja senindulga! Kaj li sendas vin pro la lepra Kenjo! Nu, kio povas tio esti, infano? Certe estas iu grava afero. Kaj kion vi faros, se kun li venos ankaŭ la maljuna Murmurulo? Sciu, tuj diru al li: "Ŝ! Tio ne estas via afero!" Tiel vi faru. Konduitu saĝe, kara infano!

Post unu horo la estro alvenigis Kenjo-n. Tiu Kenjo estis proksimume dekokjara, kaj li estis garbeca, straba, same kiel ĉiuj Murmurulidoj.

– Laŭdata Jesuo! – salutis Kenjo. He, Ive, ĉu vi denove venis hejmen?

– Jen mi venis por preparoli kun vi.

– Kun mi mem?

– Jes, por ke vi diru al mi, kie estas flavĉevalo de la onklo, diris Korpulentulo fiksrigardante lin al la okuloj.

La vilaĝestro kaj Vespulino saltleviĝis de la seĝoj. Kenjo ekrigardis ilin abrupte kaj komencis balbuti.

– Je mia fido, mi ne komprenas kion vi demandas! Ĉu malaperis la ĉevalo de frat'-Brne? Ĉu iu ĝin forŝtelis?

– Vi forŝtelis ĝin... ci jam scias, kiuj vi – diris Korpulentulo severe. Ne helpeblas kaŝi kaj vane vortojn malŝpari... ĉion oni scias.

- Kiu ja tion mensogis, fi al tricent krucoj kaj sanktuloj?!
- Tiam la estro enmiksiĝis kaj faris la mienon kvazaŭ li ĉion scius.
- Ne insultu, azenaĉo, sed diru kie troviĝas la ĉevalo.
- Sufiĉas diri nur vorton, por ke vi la morgaŭan tagon ĝisatendu en karceron, diris Korpulentulo. Kaj al vi estos plej malfacile, ĉar aliaj, post kelktempa restado en la karceron, revenos hejmen, sed vin oni soldatservigos.
- Kenjo paliĝis.
- Vin oni soldatservigos, ĉu vi komprenas, daŭrigis Korpulentulo, ĉar la onklo koleras plejparte kontraŭ vi mem. Ĉi tiel li diris: “Tiun friponon mi ekspedigos transmaren, kie ĉiumatene oni bastonados lin dekfoje, kaj tio daŭros dek jarojn”.
- Ĝuste tiel oni ekspedis pasintjare iun viron el Marbordo, kaj li mortis pro la bastonado, diris Hirtulo.
- Ho Jesuo! Ho Virgulino! Ho Josefo justa! Kion ankoraŭ oni aŭdas enmonde, suspiris Barica.
- Nu bone, sed kie estas atestantoj? demandis Kenjo.
- De kie ja mi scius, kaj kial la onklo min sendus je ĉi-vetero, se li tute ne estus sciinta kiu forkondukis lian ĉevalon.
- Nu, mi, diru ke...
- Aŭdu ĝisfine, interrompis lin Bakonja. Mi ekbedaŭris vin, kaj ekpetis onklon: “Ne faru, pastro, ĝis mi kunvenos kun Kenjo. Kiu scias, povas ĉio ĉi ankoraŭ bele finiĝi, kaj povas esti ke Murmurulido estas malplej kulpa”. Tiam frat’-Brne mildiĝis kaj diris: “Provu ni ankaŭ tion, diablo lin portu. Se li pentos kaj revenigos tuj la ĉevalon, donu al li ĉi tiujn kvin talerojn!”.
- Ĉu eĉ kvin talerojn! ekkriis la estro.
- Ho Jesuo! Ho Virgulino! Ho Josefo justa! rekomencis Barica.
- Korpulentulo denodigis el unu finaĵo de la tuko kvin kronmonerojn, kaj ofertis al Kenjo, kies okuloj ekbrilis kaj li estis prenonta la monon, sed li ĝustatempe korektis sin.
- Nu, mi ĝuste klopodos ekscii, kaj denunci...
- Ne, sed diru kie estas la ĉevalo, aŭ mi tuj donos al patro leteron de la onklo.
- Kian leteron? – demandis la estro.
- La onklo jenon komisiis: “Se Kenjo ne volos malkaŝi, vi transdonu al patro ĉi-leteron, por ke li forportu ĝin en la urbon, en la tribunalon, kaj poste estos facile”. Korpulentulo eltiris el la saketo iun leteron envolvitan per ĵurnalo.

- Donu ĉi tien! ekkriis la vilaĝestro. Tuj donu tiun leteron!
- Ja kio povas esti tio? diris Kenjo kun ioma spiro.
- Kio povas esti? Tio ĉi estas raporto en kiu troviĝas ĉio kio okazis, kiel vi la ĉevalon forkondukis, kien vi ĝin tra iris, ĉio, ĉio, ĉio, detale.
- Donu, infano! – rekriis la vilaĝestro. Mi tuj Kenjo-n katenos kaj forkondukos en la urbon, ĉar la raporto jam ekzistas. Kial ŝpari la lepron!... Donu, Barica, ŝnuron.
- Ho Jesuo dolĉa! Virgulino ĉastega! Josefo justa! kriis Barica leviĝinte.
- Ne faru, onĉjo, mi diros ĉion, eĉ se patro min mortigos! apenaŭ elparolis Kenjo, kaj la ŝvito penetris sur lian frunton.
- Kie estas la ĉevalo?! – kriegis Korpulentulo.
- Kie estas la ĉevalo?! ripetis Hirtulo.
- Ĉevalon ĉi tien, lepro de lepro! diris ankaŭ Barica.
- Jen ĝi troviĝas sube de Crni Kuk (Nigra Kokso), en la laŭbo de la onklo Nazkataro.
- Kuru, paĉjo! diris Korpulentulo doninte monon al Kenjo.
- Rapidu, mia bela Jere! aldonis la edzino.
- Ekiru ni, diris Hirtulo, preninte pistolon el la armildeponejo kaj forpuŝis Kenjon antaŭ sin.

Korpulentulon kaptis tia ridado ke li renversiĝis dorsen. Kiam Vespulino revenis, Korpulentulo estis ankoraŭ ridanta, sed pro la ega laco kaj dormemo li ne plu povis paroli, sed li surlitiĝis, petante la patrinon veki lin tuj post ilia reveno.

Barica flamigis la kandelon antaŭ "Virgulino", genuiĝis kaj komencis paroladi "preĝserion". Post elparolo de dek preĝoj, ŝi eliris antaŭdomen, por vidi ĉu ili estas reirantaj, kaj denove daŭrigis la preĝadon. Tiel daŭris ĝis antaŭaŭrore, kiam Barica ekaŭdis la ĉevalan irbatadon, kaj vekis la filon.

Kenjo eniris kondukante la flavĉevalon kolbride, kiu, tute kotmalpura, kovrita per drapaĵo, ekhenis vidante Korpulentulon. La ĉevalon postiris Hirtulo, tenante enmane pafpretan pistolon.

Korpulentulo ĉirkaŭbrakis la ĉevalon kaj komencis kisadi kaj parolkaresi ĝin.

– Miadie, filo, ĝi apenaŭ estis savita! – diris la estro. Morgaŭ matene Murmurulo volis forkonduki ĝin al Bosnia limo. Kaj ĉu vi scias kion ili decidis? Por mensogi al la onklo, ke vi transdonis la ĉevalon al iuj aliaj friponoj!

– Ho Jesuo dolĉa! Ho Virgulino ĉastega! Feliĉe frat’-Brne eksciis ĉion ĝustatempe! diris Barica.

Korpulentulo kunmetis la manojn sur la flavĉevalon, kaj rigardinte triumfe la gepatrojn, diris:

– Mia bona paĉjo, kaj mia bona panjo, nenion pri tio scias la onklo. Li eĉ nun, ĉi–momente, certe opinias ke lia ĉevalo estas aliflanke.

– Kion vi diras!... Kiel? – demandis la gepatroj dum sur la vizaĝo de Kenjo aperis eĉ pli da teruro ol antaŭe.

– Mi diras al vi: pri ĉio ĉi la onklo ne scias eĉ tiom ĉi! (dirinte tion li alkroĉis la ungon aldente). Jen mi ĉion laŭvice elrakontos, – aldonis Korpulentulo sidiĝante. Kiam antaŭhieraŭ matene alvenis Stefano kaj diris ke la transriveruloj forŝtelis la flavĉevalon, mi tuj diris al mi mem: tiuj ne estas, miadie, “la transriveruloj”, sed Murmurulidoj! Kvazaŭ Dio mem flustrus tion je mia orelo, tiel mi estis konvinkita ke tio estas ilia ago kaj ke ili intencis enplekti min en tion. Kiam la onklo kaj Stefano foriris transriveren, mi multe penis, kaj fine diris mian suspekton al la kuiristo Ekskrementulo. La bona Ekskrementulo bele min konsilis kion mi faru... Jen kiel estis...

Kenjo blovekspiris kaj retiriĝis al la ombro.

– Ho saĝa mia infano, ho bela mia infano! diris la estro brakuminte la filon.

– Feliĉe al ni por ĉiam! aldonis Vespulino forkaptante Korpulentulon el la patra brakumo. Ĉu mi ĉiam parolis al vi, Jere, ke ĉi tiu infano elstaradis laŭsaĝe, ke por li estis malmulte fariĝi monako!...

– Do, kiu estis kun Kenjo? Kion li diras? demandis Korpulentulo, rigardante la kulpulon abrupte.

– Kunestis lia patro kaj Nazkataro, diris la estro. Nu vere, kiu do skribis tiun raporton?

– Tio estas simpla paperaĉo! diris Korpulentulo devolvinte folion da senteksta papero.

– Ho Jesuo dolĉa, ĉu ankoraŭ iu havas tielan infanon!? ekkriis Barica, kaj kiom estante ĝoja, verŝplenigis glason per brando kaj ofertis al Kenjo.

– La estro direktiĝis al li, ekkriante:

– Donu tuj kronmonerojn!

– Kion? Ke mi redonu...

La vilaĝestro ekkaptis lin kaj ordonis ke Barica elprenu la talerojn. Poste la estro turnis Kenjo-n, kaj kiom eble plej forte piedfrapis lin al la plej mola loko, tiel ke Kenjo transsaltis la sojlon. Postkiam tute tagiĝis,

Korpulentulo ekrajdis la flavĉevalon, dum la patro ekiris antaŭ lin, kaj ili direktiĝis al la monakejo. Preskaŭ ĉiuj Denteguloj kaj Murmuruloj kaj Rapidmanĝuloj estis en la kortoj, kiam la patro kaj filo preterpasis, sed iu ajn nek salutprezentis sin, nek iĝis lerta pri tiu afero.

Hirtulo kaj Hirtulido atingis la riveron dum la tagmanĝtempo. Ili devis longe atendi la veturigistojn. Veninte fine antaŭ la monakejon, ili trovis ĉiujn monakojn antaŭ ĝi, ĝuste kiel tiam kiam Korpulentulo unuafoje venis. Imageblas kiel ĉiuj ekmiris. Frat'-Brne ekiris renkonten al la frato, kaj rapide ekflustris al li:

– Mi vidas pri kio temas, sed elrakontu aliel. Hirtulo elpensis ke tio estis afero de Miluŝan, ke lia filo enkaptis tion, kaj venis sciigi lin, ke li faris trapeladon kaj trovis la ĉevalon eĉ surlime, ke li donis dudek talerojn de denunco. Sed kiam restante sola kun Trogulo, li elrakontis detale la tutan veron, nur prisilentis ke li forkaptis de Kenjo tiujn kvin kronmonerojn, kaj ankoraŭ elpensis ke li promesis aliajn kvin, kiujn Trogulo tuj donis, laŭdinte Korpulentulon.

– Post la tagmanĝo, la filo forakompanis la patron al la akvoveturilejo. Je la adiaŭo, Korpulentulo diris:

– Paĉjo, aĉetu jam ĉi-semajne du novajn porlernantajn vestojn, ĉar mi ne volas servi en monakejo en pantalonaĉo kaj opankoj!

– Sed mia fileto, ankaŭ tiu sur vi estas nova... Pacienca por kelka tempo!

– Tute ne, paĉjo, kaj se miaj vestoj ne estos pretaj ĝis dimanĉo, mi diros la tutan veron al la onklo, ĉar finfine, mi formeritis tiujn dek talerojn...

– Sed Korpulentulo ne orgojlis. Male, la morgaŭan tagon li denove anstataŭis la plej junan lernanton en etaj aferoj, same kiel ĝis tiam, kaj sonorigadis la vekilon, balais la preĝejon, ordigadis la ĉelojn de la onklo, kaj plejparte helpadis al Ekskrementulo. Do, li estis laborema nelerneĵano, sed nur nelerneĵano.

LERNANTAĜO KAJ LA DUA OKAZAĜO

Nur en la nova jaro Korpulentulo komencis lerni libron. La malsaneta diakono Kaŭrulo (la vera nomo: Inoĉentije Lovriĉ, – filo de iu ŝuisto el la urbo) komencis instruadi lin al la malnovslava alfabeto. Tuttage Korpulentulo murmuradis: az, buki, vjedje, verboj ktp. kaj penadis skribi ellerni tiujn strangajn rastilojn kaj skorpiojn, kiuj nomiĝas la malnovslava alfabeto. Same li ellernis paroladi metenpreĝon kaj

meson. Korpulentulo havis flatan kaj fortan voĉon, pro kiu li iĝis tre kara al frat'-Onklino, kiu, kvankam estante la plej fama pastro en V., tamen postulis tion de la lernantoj pli multe ol diligentecon en la lernado.

Jen kiel Korpulentulo pasigadis la tempon dum la unua jaro de sia lernantaĝo.

Post lia sonorizado de la vekilo, li purigadis la ŝuojn de la onklo kaj alportadis akvon, matenpreĝe staradis kaj ordigadis la ĉelojn, poste atendadis sian "frat' " (kiel li mallonge nomis frat'-Brne) por ke li revenu de la matenmanĝo.

– Ĉu vi fermis la fenestron? demandis lin frat'-Brne el la vestiblo, ĉar, ankaŭ somere li timis eniri la ĉambron, se la fenestroj ne estis fermitaj.

– Jes, pastro.

– Ĉu vi forskuis la tapiŝojn kaj forigis polvon?

– Jes, pastro.

– Ĉu vi ne prenadis kartojn aŭ horloĝon surtable?

– Tute ne, pastro!

– Tii-el!

Ĉiumatene Trogulo vivigadis tiujn demandojn, kaj Korpulentulo ĉiam la samon respondadis.

Sur la tablo de "frat' " troviĝis aro da paperaĵoj (plejparte kantetoj de Trogulo), kaj estis plej strikte malpermesite al Korpulentulo tuŝadi ilin, sed la frat' ilin ordmetadis, purigante per anserplumo polvon sub ili. Poste la frat' etendiĝadis sur la apogseĝon, kaj metadis antaŭ sin du orajn poŝhorloĝojn. Estis lia plezurego aŭskulti klakadon de tiuj du grandaj surmuraj kaj de tiuj du malgrandaj antaŭ li. Se dumnokte unu el ili haltus, la frat' tuj vekiĝus; se la du klaksamtempis, tiam li malpli frue vekiĝadis.

De ĉe la onklo, Korpulentulo foriradis al sia protektanto Ekskrementulo, por "skuforigi roson de la koro", kiel diras la niaj. Cetere, laŭkutime, la porlernanta matenmanĝo estis panpeco. Pro dankemo, Korpulentulo helpadis al la kuiristo fortranĉi viandon, aŭ sentripigi fiŝojn, aŭ senplumigi kokon, ktp., kaj poste li revenadis al la onklo.

Nu, se la frat' ŝveligas la vangojn kaj ekklinas la kapon, Korpulentulo ekprenas de sur la bretaro iun maldikan, ĉarpentitan vergeton, kaj malrapide enigas ĝin sub la ĉemizon de la onklo kaj gratas lin surdorse. Tio daŭris minimume duonhoron, ĉar, krom la klakado de horloĝoj, tio estis plej granda plezuro al la frat'; tio iel igadis lin taŭga legi kun ĝuego la plej profundajn teologiajn verkojn kaj verki versojn. Sed, se

la frat' tuj ne ŝveligas la vangojn kaj ne ekklinas la kapon, Korpulentulo atendadas ĝis tio okazos, ĉar sen tio ili ne disiradis matene.

Post tio Korpulentulo eliradis kaj deturne paŝadis tra la alia vestibloflanko, kontraŭe al la kuirejo, kaj ekfrapadis kaj eniradis tra iu pordo inter la sakristio kaj la monakejestrĵambroj.

Tie situis librejo, kaj samtempe "instruejo".

Unue la nazo de Korpulentulo eksentadis malbonodoron de la malsekeco kaj de polvoplenaj libroj, poste liaj okuloj direktiĝadis al Jesuo Kristo surmure kaj sube al la katedro, kie sidadis unu monako. Korpulentulo fingropinte forirantis por kisi lian manon, post kio li prenadis sian lokon en la tria benko. Dum preterpaso li devis kliniĝi al la diakonoj Ĉimavica kaj Kaŭrulo, sidantaj sur la seĝoj inter la katedro kaj benkoj. Kaŭrulo tre ofte forestadis, pro malsano. Fine sidiĝadis Korpulentulo, kiel dirite, sur la trian benkon, malantaŭ la triopo de liaj kamaradoj: Virkato, Bujas kaj Virvulpo, kiujn ekzamenadis unu el la diakonoj.

Korpulentulo eltiradis sian alfabetlibron, kaj komencis murmure legadi el ĝi, aŭ rigardadis bildojn ĉirkaŭ si mem.

Ĉie ĉirkaŭe estis grandaj ŝrankoj plenaj de libroj, kiujn ĝuste ekmordis musoj, kaj sur libroj, grandaj pentraĵoj de sanktuloj, papoj, provincaj pastrestroj ktp., surtole. Oni diris al Korpulentulo ke kelkaj el tiuj pentraĵoj estas tre grandvaloraj, kaj tiaj estas: la sankta Frane, maldika kaj senliphara, tenanta iun birdeton sur la manplato, kaj karesanta ĝin per alia mano; la sankta Lovre, malgrasa, alta, juna viro, tenanta la rostilon je kiu rostis lin murdemuloj; la sankta Hieronimo ("nia samlandano"), kun la blanka ĝiszona barbo, ĝibeta nazo kaj grandaj okuloj, kiujn li malfermegis rigardante homan kranion, tiel ke ŝajnis ke li miras ĝin kaj ĝi lin; fine, iu osteca kaj duonnuda sanktulo genuis enaere, alte super iu aro da homoj, etendante la manojn kun renversitaj okuloj.

Kutime la instruadon komencadis la monakejestro kun la diakonoj. Tio daŭradis nur kelkajn minutojn. Se Korpulentulo eĉ ĝustatempe alvenis aŭskulti respondojn de la diakonoj, tio ŝajnis al li kvazaŭ la turka, tiom malmulte li povis kompreni. La monakejestrĵambro anstataŭadis frat'-Balgo, kiu mem ekzamenadis la lernantojn, aŭ ordonadis al Ĉimavica respondi ilin. Balgo-n anstataŭadis Vostvolvulo, kaj tiam Korpulentulo almenaŭ iom komprenadis, ĉar estis interpretataj "virtoj" teologiaj kaj kristanaj, "indulgagoj", monakaj devoj, eldiroj de la sanktaj patroj ktp. Fine, Vostvolvulo igadis al Korpulentulo skribadi, po centan fojon, la malnovslavan alfabeton. Pli rare li postuladis ke Korpulentulo silabu frazojn, kiuj troviĝis malsupre de ĉiu litero. Sube de "a3" estis "a-ki".

Sube de "буки" – бес–мрь–ть–нь (senmorta). Sube de "въдъ" – въ–се–дръ–жи–те–лю (ĉioporvulo)¹.

Vostvolvulo rekomendadis al diakonoj kaj lernantoj "pli severe trakti" la junan Jerkoviĉ, poste transdonadis ĉiujn al frat'-Onklino, instruanta la kantadon.

Tiam ankaŭ la diakonoj sidiĝadis kun la lernantoj, kaj tiam elstaradis Korpulentulo, kvankam tio estis al li la unua jaro de la "lernejanado".

Onklino promenadis tien kaj reen antaŭ ili, poste svingadis la vergeton, je kio la voĉoj akordiĝadis. La okuloj de Korpulentulo ardbrilis, sekvante ĉiun vergetmovon, sed kiam la vergetpinto turniĝadis al li, kaj li plifortigadis sian sonorajn voĉojn, la okuloj de Onklino ekbriladis.

– Brave, Jerkoviĉ! Faru denove sola: Kru-co, aŭ-du nin! Kru-co, indulgu nin! Di-o fa-vo-ru!...

Kaj per tio oni finadis la instruadon.

Koleremulo ne miksiĝadis en tion, li okupiĝadis pri ekonomio. Frat'-Betulo estis okupata per alia afero. Li librotenadis monakejajn fakturojn. Trogulo instruadis eklezian historion, dogmaron, hermeneŭtikon kaj... superajn aferojn, sed nur post la "siesto".

Post la lernejo, Korpulentulo ree prezentiĝadis al sia frat' por vidi ĉu li bezonas ion, kaj foriradis sonorige anonci horojn. De la preĝejo, li kun ceteraj kompanoj akompanadis la monakojn en la tagmanĝejon kaj servadis.

Post la tagmanĝo, la monakoj foriradis al sia siesto kaj la lernantoj al la sia, en la lernejon, kie kutime komenciĝadis pikŝercado. Ĉiu ŝercis siamaniere, kaj Korpulentulo imitadis la iradon, parolon, kromdirojn kaj aliajn ecojn de ĉiuj monakoj. Korpulentulo estis vera aktoro.

Post la siesto li foriradis grati la onklon je la kruoj, kaj poste kune en la lernejon. El la lernejo al vespermeso, de la vespermeso en la ĉevalstalon, por ke li helpu Stefanon kaj la purigiston Strabulon por trinki la ĉevalojn.

Tio estis la plej kara periodo de Korpulentulo. Estis bele vidi, kiam li, tiel fortika kaj facilmova, ekrajdas la senselan ĉevalon, kiu sub li iom rektleviĝas, aŭ trotetas aŭ saltetas "lepore". Stefano profetis: ke neniam ekzistis tia brunhara rajdanto kia estos kun la tempo tiu juna Jerkoviĉ. Ankaŭ Koleremulo diris plurfoje:

– Ĉi tiu Hirtulido kvazau ne devenus de ilia raso! Tio estos bravegulo – bona soldato de la sankta Frane!

¹ Malnovslavaj literoj "Az" (A), Buki (Bo), Vjedji (Vo), noto de la tradukinto

Tiel viciĝadis al Korpulentulo tago post tago en la monakejo. Kun li kreskis "belec' ", fortec' ", diamem', favorec' ", kiel parolis la onklo Hokstango; sed li malmulte progresis en la alfabetlibro, pri kio li ne estis kulpa, nek kulpis la bonanima diakono Lovriĉ, kiu ekŝatis Korpulentulon ekde la unua tago, sed kiu malmulte povis instruadi lin, pro sia malsano. Se pri tio kulpas iu, tiam kulpas ĝuste frat'-Brne. Sed, tamen, ankaŭ frat'-Brne povis senkulpigi sin, ĉar la viro kiu menspenadas per la verkoj de Hieronimo, Tomo Akvitana kaj kvindek aliaj patroj, tiu ne povas sinokupi pri la komencanto.

Cetere, frat'-Brne estis tute kontenta pri sia nevo, kvankam la monako neniam tion eksplicite certigis. Sed tio juĝeblis laŭ kelkaj indikoj, sed pleparte laŭ tio ke li somerfine diris al la frato Hirtulo, veninta informiĝi:

Jen, li estas azensanga, sed tamen mi ne povas plendi pri li. Ni vidos laŭtempe!

Vi povas imagi, kiel la vilaĝestro ornamis tion postrevene kaj kiel tio reekis en Zvrljevo.

Murmuruloj kaj Denteguloj ĉagrenegis, sed malgraŭ ĉio ĉi, Hokstango, veninte foje porafere en la monakejon, deziris – ĝuste deziris – ekflati Hirtulidon. Kaj la saĝa Hirtulido afable akceptis la onklon kaj salutis Nazkataron, Traserĉulon, Murmurulon, Controna-n, Ĉandrljika-n kaj ĉiujn, ĉiujn laŭvice.

Kiam alvenis la rikoltotempo, ĉiuj el la monakejo disiris transriveren, escepte de la monakejestro, Kaŭrulo kaj Ekskrementulo. Korpulentulo restis kun la onklo kvar semajnojn en la vinberejoj, kaj kariĝis al ĉiuj vilaĝanoj kaj lia nomo diskoniĝis eĉ ekster la parokoj de la sankta Frane.

Poste revenis la morta aŭtuno kaj oni redaŭrigis la monotonan enmonakejan vivon. Tiel estus daŭronte ĝis la printempo, se, ĝuste je la Nova jaro, ne ekestis la malagrabra okazaĵo, kiu havis strangajn konsekvencojn.

Je la unua tago de la nova jaro ekblovegis la nordvento, kvazaŭ ĝi ĉion forportus. La malfiksitaj bretoj supre de la vestiblo kaj la nealkroĉitaj fenestro-kovriroj brubatis je ĉiuj flankoj.

Frat'-Onklino, la unika fruleviĝanto el ĉiuj fratoj, eliradis dumnokte du-trifoje el sia ĉelo, kaj vizitadis la vestiblon, timante ke la vento ekportos de ie brulaĵon kaj aligos ĝin al la putraĵo.

Dum la matenkrepusko, ĉiuj kvar sonoriloj anoncis la matenpreĝon, sed ilia sono apenaŭ aŭdeblis en la venta tumulto. La monakoj, kovritaj per la kapotoj, forkuris travestible al la preĝejo.

Tri plej junaj pastroj vestis sin en preĝejvestaĵojn kaj la meso komenciĝis. Korpulentulo kaj Virkato, en la korusĉemizoj, incensadis antaŭ ili. Ekskrementulo tiradis ŝnurojn malantaŭ la orgeno, kaj frat'-Onklino, frapetante la orgenklavojn, plankbatadis per piedoj por ilin varmigi, skuadis la kapon, por ke la kolo ne rigidiĝu, kaj kiam ajn eblis, albuŝigadis la manojn por spirblovi al ili. Same faradis la aliaj, kaj krome ĉiuj kriegis kune, ĉar vere la homo iom varmiĝas per kantado. Kiam tiu kriaĉado atingis la plej grandan dishamonion, frat'-Onklino ekkoleris, poste ankaŭ komencis nevole frapadi la orgenklavojn, tiel ke el la tuboj elflugadis diversspecaj sonoj.

Sed kiam suno aperis, la vento komencis malfortiĝi, kaj, iom post iom, tute ĉesis, tiam reekstis ankaŭ la harmonio en la preĝejo. Ĉiu ektimis sian pekan agon, kaj por penti pri ĝi, ĉiu flate ekkantis.

(daŭrigota)

El historio de Kosovo

Miodrag Stojanović

KOSOVO EN SERBIO

En Kosovo, regiono de la centro de Balkana insulo, kie jam en antikvaj tempoj interkruciĝis gravaj komercaj vojoj, slavaj triboj loĝiĝis dum la periodo inter la sepa kaj la deka jarcentoj. En la periodo de la plej granda supreniro de mezepoka Serbio, fine de la XIV jarcento, same kiel en ĝia zenito, en la unua parto de la XV jarcento, Kosovo estiĝas ne nur la plej riĉa kaj la plej dense loĝigita parto sed ankaŭ grava kultura kaj administra centro de Serbio. Lokita en vojkruciĝo de ĉefaj balkanaj vojoj kiuj interligadis ĉirkaŭajn serbajn landojn, Kosovo estis ankaŭ geografie la plej taŭga por la ŝtata kaj kultura centro.

En miljara historio de la serba popolo, Kosovo dum jarcentoj estis ŝtata kaj kultura centro, fokuso de la serba kulturo kaj elirpunkto de historiaj tradicioj. En la tradicio de kosova suferado dum Kosova batalo (1389), paralele estis finkonstruitaj kaj moderna serba spiriteco kaj aktuala nacia ideologio.

En metohoj de grandaj serbaj monakejoj estis fonditaj, dum la XIII kaj XIV jarcentoj, grandaj suverenaj fondaĵoj kaj iliaj metohiaj kirkoj. Arkitekturo de monakejoj (kirkoj) kaj iliaj pentraĵoj superis senperajn modelojn el la cirko de tradicia bizanca spiriteco.

Kosovo ne estas nur teritorio de unu vota lando sed ankaŭ spaco de aparta historia rememoro kaj la gvidideo dum longjara batalo por la nacia kaj ŝtata sendependeco. En la kosova voto kiel la ŝlosila difino de la moderna serba identeco ekzistas unu metafizika energio kiu per diversaj intencoj trasorbegas historian rememoron, religian tradicion, nacian identecon, historian rajton kaj, nature, pripensadon de ŝtataj interesoj.

Leĝe starigantaj ĉartoj, per kiuj serbaj suverenoj donacis al monakejoj grandajn bienojn, alportas detalan kaj tute fidindan demografian bildon de tiu ĉi spaco kun grandparte serba loĝantaro. Pli rimarkendan koloniigon de albanaj triboj en Kosovo oni ne povas konstati pli frue ol la fino de la XVII jarcento. Apenaŭ per islamigado, albana

koloniigo en serbajn landojn ricevis ekspansieman karakteron. Per islamigado ankaŭ estis ĉirkauprenita la serba loĝantaro. Tio ĉi poste kaŭzis grandan migradon de serboj fine de la XVII kaj en la komenco de la XVIII jarcentoj kaj la konsekvenco estis granda demografia perturbo kaj pli ampleksa loĝiĝo de albanaj triboj.

La ondo de grandaj naciaj liberigaj moviĝoj de kristanoj en Balkana duoninsulo komence de la XIX jarcento efektivigis ke albanoj fariĝis la plej gravaj gardistoj de turka sistemo en eŭropaj regionoj de Osmana imperio.

Kosova ideo atingis sian kulminon dum la Unua mondmilito (1912) kiam, post kvin jarcentoj, en la venko kontraŭ turkoj, serboj revenis en sian sanktan landon Kosovo.

En jugoslavia periodo de serba historio, aparte dum la komunista epoko, kosova ideo elmergiĝis el la komuna subkonscio, kiel respondo al eksplodo de secesia movado de albanoj en tiu ĉi serba provinco. Montriĝis ke la kosova voto – elekto de libereco en la ĉiela imperio anstataŭ humiligo kaj sklaveco en la tera imperio – estas daŭra kunliga histo, kiu al serba popolo donas la senton de popola tuto.

Se la Kosovo por serboj estas vota lando, ĝi por albanoj dum pluraj jarcentoj estas sociale kaj ekonomie dezirinda spaco por loĝigo kaj plua demografia eksplodo. En nuntempa nacia ideologio albanoj, post la formado de Ligo en urbo Prizren (1878) montris sian pretendon por plena etnografia dominado sur tiu ĉi suda parto de Serbio. Tiamaniere konfliktoj kaj migradoj estiĝas unu el konstantaj karakterizoj de kosova pasinteco. Kvankam science fonditaj argumentoj estas serbaflanke, hodiaŭ al internacia publiko altrudiĝis konflikto ĉirkaŭ historia aparteno de Kosovo.

Ni esperas, karaj amikoj, ke ankaŭ vi povas helpi kaj kontribui al pli justa solvo de tiu ĉi, ne nur serba sed tutmonda problemo, almenaŭ publikigante tiun ĉi modestan artikolon en viaj medioj kaj publikaĵoj.
(Dankon!)

Lingvoj

d-ro Pribislav Marinković

ĈU EKZISTAS IU LIGO INTER LADINO KAJ ESPERANTO?

Ĉu vi aŭdis pri *ladino*? Kio ĝi estas, ĉu oni manĝas ĝin, aŭ dancas, aŭ portas? Ne, absolute ne, ladino estas lingvo. Sed kiu kaj kia, ĉar en la mondo oni parolas kelkajn milojn da lingvoj. Iuj sciencistoj, lingvistoj, diras ke ĝis antaŭ nelonge funkciis ses mil, la aliaj tri mil lingvoj! Ĉio dependas de tio, kia estas respondo al la demando: kio estas lingvo, kaj pro tio ni havas diversajn respondojn.

Kiu popolo parolas per ĝi? Ĉu ĝi estas viva aŭ morta lingvo? Ĉu ekzistas literaturo en ladino? Kia estas lingva bazo kaj al kiu lingvofamilio ĝi apartenas? Estas multaj demandoj de tiuj, kiuj neniam, aŭ nur iom, aŭdis pri la ladino.

La ladino estas lingvo, kiun parolas la hispanaj judoj. Multaj el ili venis en Jugoslavion dum persekutoj de judoj okaze de la katolika inkvizicio antaŭ kelkaj jarcentoj. Same kiel Serboj el Kroatio kaj Bosnio, dum la dua mondmilito kaj dum disfalo de Jugoslavio, pli bone dirite dum perfido de komuna ŝtato kaj la ideo pri solidareco, frateco kaj unueco de jugoslaviaj popoloj, je kiuj multaj, ne nur soldatoj kaj ĵudistoj, faris solenajn ĵurojn, do kiel rifuĝintaj al Serbio – la hispanaj judoj forpelitaj el sia patrolando alvenis amase ankaŭ al Balkana duoninsulo, plejparte en Bosnio kaj Sarajevo. Ili nomiĝas sefardoj, diference de judoj el Germanio kaj okcidenta Eŭropo nomiĝantaj aŝkenazoj, same multaj alvenintaj al Balkana teritorio.

La lingvon ladino kelkaj nomiĝas: *ŝpanjol*, *djudio* kaj *dĵudeo-espanjol*. La aliaj homoj tamen konsideras ke la ladino estas lingvo de la biblia teksto tradukita el la hebrea aŭ aramea al la hispana, skribita per la hebrea aŭ raŝia alfabeto. La substantivo *ladino* devenas de la verbo “enladinar” kio signifas “tradukita al la hispana”. Do, la ladinon oni povas nomi kiel jud-hispanan lingvon.

La historio de la lingvo ladino estas vere historio de iu popolo suferanta regadon de diversaj ŝtatoj ne havanta la sian. Vagante tra

Eŭropo, Afriko, Turkujo kaj la tuta mondo la hispanaj judoj trasuferis multajn influojn de la tempo kiam ili estis elpelitaj el Hispanio. Pro tio la ladino havas multajn vortojn de la lingvoj itala, franca, germana, turka, greka, serba, araba... Kompreneble, la hispana lingvo estas la kerno de la ladino.

Ni menciuj nur kelkajn el ili. La italaj: bisonjo (bezono), kuŝin (kuseno), letra (letero), butika (butiko), biljeto (bileto), lavoro (laboro); la franca: valor (valor), reproŝo (riproĉi), dormir (dormi); la turkaj: ĉanta (sako), kismet (destino), hairli (feliĉa). Sefardoj vivantaj sur la Balkana duoninsulo transprenis kaj uzas multajn slavajn, serbajn vortojn.

La ladino plej ofte uzas latinan abecedon kaj fonetikan regulon de Vuk Karadžić: skribu kiel vi parolas, legu kiel estas surskribite! Krom tio ĝi apartenas al la romanaj lingvoj samkiel la hispana, portugala, franca, itala, rumana, aromana, retoromana...

Laŭ tiuj tri gravaj karakterizoj ladino estas tre simila al Esperanto.

Similecon al Esperanto oni povas facile vidi laŭ la komunaj vortradikoj. Ni citu kelkajn vortojn laŭ vortspecoj:

substantivoj - razon = rezono, onor = honoro, bouqut = buketo, rosas = rozoj, kampo = kampo, kuante = kanto, tiera = tera, sinjor = sinjoro, romanses = romanoj, amor = amo, mar = maro, korason = koro, kantika = kanteto, djusticia = justeco, tiempo = tempo, dolor = doloro, pasiensija = pacienco, sol = suno, agua = akva, amiga = amikino, djoja = ĝojo, sentimento = sentemo, flor = floro, kortižu = korto, dulce = dolĉaĵo, kandelikas = kandeletoj, oriente = oriento, tiempo = tempo, kuerpo = korpo, muno = manoj.

verboj – dezero = deziras, sufrir = suferi, murir = morti, dormir = dormi, diŝe = diras, kolaborar = kunlabori, (e)stas = estas, puede = povas.

prepozicioj – kon = kun, en = en, an = al, por = por, de = de, en = en, pur = pro.

adjektivoj – mi = mia, grande = granda, buena = bona, kerida = kara, profundo = profunda, mal = malbona, tristi = trista, unika = unika.

numeraloj – unu, una = unu, tres = tri, mil = mil

Ĉe la fino de tiu ĉi priskribo jen iu poemo en la ladina lingvo:

Ne puedu mas
Si tu no stas
Kon me

Mi ne povas plu
Se vi ne estas
Kun mi

Mi dolor kajente

Tu lo siente

Da kuando te separaste de mi

Mian doloron varman


Vi ĝin sentas

De kiam vi separatiĝis de mi.

Se iu deziras pli ekscii pri la sefardoj, iliaj pensoj, literaturo kaj la ladino li povas tralegi tre interesajn librojn de Gordana Kujić. La romanoverkistino Gordana Kujić (1942), diplomita filologino, naskiĝinta kaj vivanta en Beograd, ĝis nun eldonis de 1986 ĝis 2006 sep romanojn. Kvin ricevis rekonojn “Oraj bestseler” (la plej bonvenditaj) kaj ŝia lasta libro *Balada o Bohoreti* (Balado pri Bohoreta), eld. Narodna knjiga, Alfa, estas premiita per “Ora plumo”, kiel la plej bona romano en 2006.



Jubileoj



MILUTIN MILANKOVIĆ

(1879 – 1958)

Milutin Milanković naskiĝis la 28-an de majo 1879 en Dalj, kiu tiam estis en Aŭstro-Hungario kaj hodiaŭ en Kroatio. Li frekventis Teknologian instituton en Vieno. Tie li fariĝis konstruteknika inĝeniero en 1902 kaj fariĝis doktoro de tekinkaj sciencoj en 1904. Li laboris en Vieno ĝis 1909, kiam oni proponis al li katedron de aplikata matematiko ĉe Beograda universitato. Tio estis turnopunkto en lia vivo. Kvankam li daŭrigis esploradon de fortigita betono, li decidis koncentriĝi pri fundamentaj esploroj.

Post kelkaj jaroj sekvis turbulaj okazaĵoj, unue Balkanaj militoj (1912 kaj 1913) kaj poste La unua mondmilito. Milanković jam en 1912 interesiĝis pri esplorado de suna klimato kaj planetaj temperaturoj. Kiam komenciĝis la mondmilito (en 1914), Milanković estis ĵus edziĝinta. Aŭstro-Hungara armeo internigis lin en Budapeŝton, kie li povis labori en la biblioteko de la Hungara akademio. Li sian tutan tempon dediĉis al sia laboro pri klimato kaj ĝis la fino de la milito li finis monografion, kiun en 1920 publikigis Jugoslavia akademio de sciencoj kaj artoj sub la titolo *Théorie mathématique des phénomènes thermiques produits par la radiation solaire* (Matematika teorio de termikaj fenomenoj kaŭzitaj per suna radiado). Tiu verko faris al li bonan reputacion en la scienca mondo, precipe pro kurboj de insolacio de la tera surfaco. Tiuj kurboj ne estis tute akceptitaj ĝis 1924, kiam meteorologo kaj klimatologo Vladimir Kepen (Wladimir Köppen) kun sia bofrato Alfred Vegener (Wegener) prezentis la kurbojn en sia verko *Climates of the geological past* (Klimatoj en la geologia pasinteco). Poste Milanković estis kunaŭtoro de du gravaj manlibroj – *Handbuch der Klimatologie* (Manlibro de klimatologio) kaj *Guttenberg's Handbuch der Geophysik* (Gutenberga manlibro de Geofiziko). Por la unuemeniciita li skribis enkondukon *Mathematische Klimalehre und astronomische Theorie der Klimaschwankung* (Matematika scienco pri klimato kaj

astronomia teorio de variacioj de klimato). La manlibro estis publikigita en 1930 germanlingve kaj estis tradukita en la rusan en 1939.

Por la alia manlibro Milanković skribis kvar sekciojn disvolvante kaj formiligante siajn teoriojn – teorion de jarcentaj moviĝoj de teraj polusoj kaj teorion de glaciaj epokoj (cikloj de Milanković) bazite sur pli fruaj verkoj de Ĝejms Krol (James Croll). Li sukcesis plibonigi la verkon de Krol. Koscia, ke lia teorio de sunradiado estas sukcese kompletigita kaj ke pri tiu teorio okupiĝas pluraj verkoj, li decidis kunigi ĉiujn partojn de la teorio kaj publikigi ilin sub unu titolo.



Bildo – Kanono de tera insolacio kaj ĝia apliko al problemo de glaciaj epokoj (1941) de Milutin Milanković, la kovrilpaĝo

Antaŭ la komenciĝo de la mondmilito en Jugoslavio en 1941 estis kompletigita presado de lia granda kaj la plej grava verko *Kanon der Erdbestahlung und seine Anwendung auf das Eiszeitenproblem* (*Kanono de tera insolacio kaj ĝia apliko al problemo de glaciaj epokoj*). La verko estas 626-paĝa kaj ĝin publikigis Serba reĝa akademio. La verko estas tradukita en la anglan en 1969 sub titolo *Canon of Insolation and the Ice-Age Problem*.

Kritikoj de lia teorio pri glaciaj epokoj komenciĝis en kvindekaj jaroj. Kritikoj plejparte estis de meteorologoj, kiuj asertis, ke insolaciaj variacioj kaŭzitaj de variacioj en orbito de Tero estas tro malgrandaj kaj ne povas kaŭzi gravajn variaciojn en klimata sistemo. Tamen, fine de sesdekaj kaj sepdekaj jaroj esploroj de sedimentoj en profundaj maroj konfirmis liajn opiniojn ĉar ili malkovris periodecon (100.000-jaran), kiu kongruis kun orbita periodo. Scienca genio de Milanković estis rekonita la 10-an de decembro 1976, kiam en periodaĵo „Scienco“ oni publikigis finajn rezultojn de granda kvinjara esplorado, kiu havis celon respondi al demando, ĉu kalkuladoj de Milanković estis ĝustaj. Tiam estis konstatite, ke variacioj en orbito de Tero indikas glaciajn periodojn. De tiam teamoj de fakuloj intense studas verkojn de Milanković, ĉar lia verko estas parto de pluraj sciencaj branĉoj.

Milutin Milanković proponis, interalie, reformon de kalendaro kaj proponis la plej precizan kalendaron ĝis nun (kalendaro de Milanković).


En la jaro 1920 li estis elektita korespondanto de Serba akademio de sciencoj kaj artoj kaj en 1924 korespondanto de Jugoslavia akademio de sciencoj kaj artoj.

Kiam germana okupacia administracio en La dua mondmilito de profesoroj de Beograda universitato postulis, ke ili subskribu Alvokon al serba popolo (kaj subtenu la okupacion), Milutin Milanković estis inter tiuj, kiuj rifuzis fari tion.

Laŭ li estas nomita unu kratero sur Luno (34-kilometra kratero Milanković sur la nevidebla parto de Luno), unu kratero sur Marso (118-kilometra kratero Milanković) kaj unu astro (1605 Milanković).

Milanković mortis en la jaro 1958.

Adem Jakupović



VERDAJ AMIKAJ TAGOJ EN SENTA

Okaze de jaro de lingvoj 2008. Esperanto-societo Senta, Serbio, Eŭropo organizos esperantan renkontiĝon de la 13-a ĝis la 15. de junio sub la nomo VERDAJ AMIKAJ TAGOJ. La titolo de la programo estas ĈIUTAGA BABELO. Dum staĝo oni deziras montri la lingvajn problemojn per ekspozicio de 100 nacilingvaj porinfanaj libroj. La prelego temas pri problemoj kun multnacia etoso en la regiono, kaj ebleco, kiun donas la uzo de Esperanto en internaciaj rilatoj. Oni petas esperantistojn el la tuta mondo helpi en kolektado de 100 porinfanaj libroj en nacia lingvo kaj vokas ĉiujn partopreni la renkontiĝon.

Publikigita en „Monato“
Turismo en Serbio

Diabla urbeto

En suda Serbio, proksime al la urbeto Kuršumlija, je ĉirkaŭ 90 kilometroj de la urbo Niš, troviĝas rimarkinda miraklo de la naturo. Ĝi estas konata sub la nomo Diabla Urbeto. Temas pri 202 ŝtonkolonoj, kiuj altas de 2 ĝis 15 metroj kaj larĝas de duonon da metro ĝis tri metrojn. Cetere, tio estas naturfenomeno unika en Serbio kaj tre malofta en la mondo.

Ŝtonkolonoj ekestis sekve de erozio sur tereno de malkompakta grundo. Iam tiu tereno estis centro de vulkana aktivado. Tamen homo estas „krimulo“. Oni detruis arbaron, kaj rezulte de la akvoefiko dum centoj da jaroj estiĝis ŝtonturoj. Sur iliaj pintoj staras ŝtonĉapoj, kiuj servas kiel pluvombreloj, sed la akvaj torentoj plu alportas teron, kaj la kolonoj plialtiĝas.

Pro siaj nombro, grandeco kaj stabileco la Diabla Urbeto estas la plej konata natur-monumento de tiu speco en Eŭropo. Ĝi estas proklamita nacia naturvaloraĵo de eksterordinara graveco kaj troviĝas sub ŝtata protekto.

Apud la neordinara ŝtonurbeto ekzistas du mineralaj fontoj. La unua, en Diabla Kanjono, estas tre acida (pH 1,5) kun alta enhavo de mineraloj (15 g/l), kaj la dua fonto, nomata Ruĝa Fonto (pH 3,5), estas

kun malalta enhavo de mineraloj (4372 mg/l). La mineralakvo el ambaŭ fontoj estas tre utila por kuracado de diversaj malsanoj, asertas fakuloj.

En la popolaj legendoj oni mencias, ke tiuj ŝtonkolonoj estas ŝtonigitaj nuptogastoj, kiuj volis laŭ la deziro de diablo edzigi fraton al fratino. Kompreneble, Dio punis tiun geedzigan feston. Nuntempe la Diabla Urbeto estas nur turisma allogaĵo.

Kunlaboro de beogradaj kaj ĉikagaj esperantistoj

Beograda Esperanto-societo "Radomir Klajić" en Serbio kaj Esperanto-societo de Ĉikago en Usono ĉi tiujn tagojn establadis unuajn ligojn. Ideo devenis de s-ro Viktor Pajuk, prezidanto de Ĉikaga Esperanto-societo.

Ĉikago kaj Beograd ĝemeliĝis la 7-an de junio 2006. Ĉarton pri ĝemeliĝo subskribis tiamaj urbestroj de Beogrado kaj Ĉikago, Riĉard Dejli kaj Nenad Bogdanović. Beogrado per subskribo de ĉarto fariĝis la 25-a urbo (apud Milano, Parizo, Ateno, Ŝangajo, Moskvo k.a.), kiu ĝemeliĝis kun tiu urbo kun tri milionoj da enloĝantoj.

Esperantistoj de la du urboj planas interŝanĝi informojn pri aktivecoj por siaj bultenoj, organizi interkonojn kaj personajn kontaktoj en kongresoj, interŝanĝi librojn kaj esperantaĵojn kaj partopreni en interurba kunlaboro.

Unuaj paŝoj estas faritaj. Ni esperas, ke kunlaboro en estonteco helpos al ambaŭ societoj plibonigi lernadon de internacia lingvo kaj amikajn kontaktojn de esperantistoj el tiuj geografie malproksimaj sed anime proksimaj urboj.

Publikigita en *Informilo ge ĝemelaj urboj n-ro 1(24)*
Dimitrije Janičić

El la gazeto de klerigantoj en Serbio

DETALE TEKSTO PRI ESPERANTO

La gazeto de klerigantoj de Serbio "Prosvetni pregled" ("Kleriga revuo", ISSN 0033-1651) en sia numero 2360 – aperigis grandan tutpaĝan artikolon pri Esperanto. Tio estas teksto de prelego en tradicia Renkontiĝo de pedagogoj de Serbio okazinta fine de la pasinta jaro en urbo Loznica, okcidenta Serbio. La aŭtoroj estas Dimitrije Janičić kaj

Radojica Petrović. En la teksto, krom mallonga historio de Esperanto, aparta atento estis direktita al laboro de ILEI, projekto AKEL, analizo de la enhavo de IPR (Internacia pedagogia revuo) kaj ebleco lerni Esperanton pere de "lernu!".

La analizo de enhavo de IPR montras iujn avantaĝojn de pedagogiaj principoj kaj spertoj akiritaj en pedagogia laboro de Esperanto-instruistoj kaj eblecojn de ilia apliko en laboro de instruistoj de aliaj lernejoj studobjektoj. Pedagogiaj spertoj de esperantistaj pedagogoj ekestis per samspeca laboro en diversaj sociaj, naciaj kaj kulturaj areoj, kio ilin faras specifaj por sama la celo – pli bonaj rezultoj de la pedagogia laboro. Krom interesiĝo pri la internacia lingvo, ĉi tiu prelego vekis apartan intereson de pedagogoj pri la specifeco de pedagogiaj spertoj de esperantistoj en diversaj landoj.

Alie, ĉi tio estis la dua partopreno de esperantaj instruistoj en konferencoj de pedagogoj de Serbio, ĉar jaron antaŭe la konata Cseh-instruistino Tereza Kapista parolis en renkontiĝo de pedagogoj pri siaj internaciaj spertoj.

Beograda esperantistaro

DU AGRABLAJ OKAZAĴOJ

Pasintsemajne en beograda muzika lernejo "Davorin Jenko" okazis internacia konkuro de junaj muzikistoj, lernantoj de muzikaj lernejoj. Partoprenis junaj lernantoj el muzikaj lernejoj el Serbio, Rusio, Makedonio, Ukrainio, Slovakio kaj Germanio. Du unuaj lokoj konkeris lernantoj de konata beograda esperanta kaj muzika familio Majstorović. Knabino Umbina estis la unua en muzikludo de instrumento korno kaj junulo Umbaja Majstorović estis ĉampiono en muzikludo en instrumento hobojo. Interese estas ke Umbaja restadas en ferio, ĉar li studas en konservatorio "Hector Berlioz" en Parizo. Tie li loĝas ĉe esperanta familio Markov, konataj francaj esperantistoj kaj aktivuloj de SAT.

Familio Majstorović, interalie, partoprenas multajn esperantistajn okazaĵojn, ĉar kvar geinfanoj muzikludas diversajn instrumentojn.

* * *

Esperanto-societo "Radomir Klajić" en Beogrado, lundon, dum la kunveno, festis duonon de jarcento de aktiva esperantista laboro de Adem Jakupović, membro de prezidantaro de la societo. Familio Jakupović estas komplete esperantista familio. Patro de Adem estis tre

konata esperantisto en iama Jugoslavio. Edzino de Adem, Etelka, jam kvardek tri jaron instruas Esperanton al lernantoj de Lernejo por malbone vidantaj lernantoj en Zemun. Nevino de Etelka, ankaŭ estas esperantistino. Adem nun estas sekretario de Serbia Esperanto Ligo.

Societanoj interparolis pri la historio de la societo kaj pri laboro de Adem, gratulante tiun jubileon kaj dezirante ankoraŭ longan aktivecon al li kaj tiu esperantista familio.

Dimitrije Janičić

Publikigita nova vortaro

Komence de aprilo 2008 aperis longe preparata nova vortaro esperanta-serba kaj serba-esperanta. La aŭtoroj de la vortaro estas Adem Jakupović, kiu eldonis ĝin, kaj forpasintaj samideanoj Momčilo Ocokoljić kaj Marko Petrović.

La vortaro estas ĉ. ducentpaĝa A5-formata kaj, krom vortara parto, enhavas ankaŭ mallongan (kelkpaĝan) prezenton de esperanta gramatiko.

Pri libro „Kien gvidas min vojoj“

Nia samideanino Emilija Matić prezentis al ni sian libron de poemoj kiujn ŝi verkis nacilingve. La poemoj estas tre belaj, profundaj, plenaj de emocioj, ĝojaj, doloraj, priskribo de naturo el ŝia infanaĝo, kiam ŝi ankoraŭ vidis, amaj kaj esperaj. La promocion de la poemaro ĉeestis multaj esperantistoj kaj en la programo partoprenis magistro Burić Ranko, Nedeljka Ložajić, Vesna Radulović, Daniela Petrović, Bratislav Joksimović kaj aliaj. La kovrilpaĝon kaj ilustraĵojn faris la edzo de la aŭtorino Dragan Matić.

Etelka Kiš-Jakupović

Internacia Virina tago en Hiroŝima

En Hiroŝima la 8an de marto okazis kunveno de la Internacia Virina Tago de UN ĉe Suda Kultura Halo kun 500 partoprenantoj, kaj ĉiuj ricevis broŝuron kun mesaĝoj el la tuta mondo. Krome, de la 2a ĝis la 9a de marto, ĉe la Urba Virina Eduka Centro okazis ekspozicio de la mesaĝoj, kaj 200 vizitintoj legis interese ilin, sume 157 mesaĝojn el 50 landoj:

el Azio(17): Barato 2/ Ĉinio 3/ Irano 1/ Israelo 3/ Kazaĥio 1/ Koreio 2/ Nepalo 2/ Pakistano 1/ Uzbekio 2/

el Oceanio(6): Aŭstralio 5/ Novzelando 1/

el Nordameriko(9): Kanado 3/ Usono 6/

el Sudameriko(7): Argentino 2/ Brazilo 2/ Kostariko 1/ Kubo 2/

el Afriko(10): Benino 2/ Gano 1/ Kongo 1/ Komoro-insuloj 1/ Madagaskaro 1/ Niĝerio 1/ Senegalio 1/ Sudafriko 1/ Togolando 1/

el Eŭropo(108): Albanio 2/ Belgio 5/ Britio 1/ Bulgario 3/ Ĉeĥio 4/ Danio 3/ Finnlando 3/ Francio 33/ Germanio 4/ Hispanio 3/ Islando 3/ Italio 9/ Hungario 5/ Kroatio 1/ Luksemburgo 1/ Malto 1/ Nederlando 4/ Norvegio 2/ Pollando 5/ Rusio 4/ Serbio 5/ Svedio 3/ Svislando 3/ Ukrainio 1.

OSIOKA Taeko (Japanio)



Esperanto-kurso

Бориша Милићевић

Додат на корен речи, суфикс -an означава становника, односно члана или припадника онога што је у корену речи:

urbo	-град, варош	vilaĝo	-село
urbano	-грађанин	vilaĝano	-сељак
urbanino	-грађанка	vilaĝanino	-сељанка
societo	-друштво, удружење	Eŭropo	-Европа
societano	-члан друштва	eŭropano	-Европљанин
societanio	-чланица друштва	eŭropanino	-Европљанка
Vojvodino	-Војводина		
vojvodinano	-Војвођанин		
vojvodinanino	-Војвођанка		

Ano значи: припадник, члан.

Називи припадника народа или становника градова, те припадника држава и континената пишу се малим почетним словом.

∴

Суфикс -ul означава биће које има својство из корена речи:

fako	-струка, фах, претинац	fakulo	-стручњак
gaja	-весело, а, о	gajulo	-веселяк
bela	-леп, а, о	belulo	-лепотан
juna	-млад, а, о	junulo	-младић

Ulo значи биће.

∴

Разговор – Konversacio

	Kiel vi fartas?	-Како си (или сте)?	
tre	-врло, веома	aŭ	-или
kio	-шта, што	tio	-то, оно
tio ĉi ili ĉi tio	-ово	pri	-о
bunta	-шарен, а, о	ekzerci	-вежбати
koloro	-боја	ho!	-ох! хо!

- Saluton, mia amikino! Kiel vi fartas?
- Dankon, mi fartas tre bone.
- Kio estis hieraŭ en la societejo?
- Estis konferenco pri la laborplano de nia societo.
- Kio estas tio?
- Tio ĉi (aŭ ĉi tio) estas unu bona libro de Esperanto.
- Ĉu vi lernas el ĝi?
- Jes, mi lernas lecionojn. Ĝi havas 16 lecionojn. Ili estas mallongaj kaj praktikaj.
- Mi ankaŭ lernas Esperanton, sed mi ankoraŭ ne parolas ĝin. Mia kamarado Bomiĉ estas bona fakulo de Esperanto kaj mi ekzercas kun li.
- Ĉu vi ellernis kolorojn en Esperanto?
- Jes mi ellernis ilin: verda –зелен, а, о; nigra –црн, а, о; ruĝa –црвен, а, о; blanka –бео, а, о; flava –жут, а, о; blua –плав, а, о; bruna –браон; griza –сив, а, о.

∴

Када се дода на корен речи суфикс –ebl означава могућност радње у корену речи. Може се употребити само уз прелазне глаголе.

kompreni	-разумети, схватити	komprenebla	-разумљив, а, о
vidi	-видети	videbla	-видљив, а, о
legi	-читати	legebla	-читљив, а, о

Eble значи можда.

∴

Суфикс –on означава разломак броја у корену речи.

du	-два	duono	-половина
kvar	-четири	kvarono	-четвртина
ses	-шест	sesono	-шестина

Kioma horo estas nun? –Колико сати је сада?

Nun estas la sesa (horo) kaj duono. –Сада је пола седам (шест и по).

Ĉu vi estis en la societejo je la oka kaj kvarono? –Да ли си био (или сте били) у Друштву у осам и четврт?

Ne, mi venis precize je la naŭa horo. –Не, ја сам дошао тачно у девет сати.

За *обележаванье* часова у есперанту се употребљава редни број са одређеним чланом, а нашем предлогу у одговара предлог je. Упитна реч kioma значи колики, а, о (по реду).

Je kioma horo vi povas sendi leteron al nia kamarado Bomiĉ?

У колико сати можеш (или можете) послати писмо нашем другу **Бомићу**?

Mi povas sendi ĝin je la deknaŭa horo.

Могу га послати у **19** сати.

∴

Једини префикс који означава оба рода односно пола је ge-. Употребљава се увек са кореном речи или изведеницом у множини, али без суфикса -in.

sinjoro	-господин	gesinjoroj	-господин и госпођа
sinjorino	-госпођа		-господа и госпође
fraŭlo	-момак	gefraŭloj	-момак и девојка
fraŭlino	-девојка		-момци и девојке

Међу есперантистима се често чује реч gesamideanoj. Ова реч се састоји од следећих делова:

sama	-исти	ideo	-идеја
samideano	-истомишљеник		
gesamideanoj	-истомишљеник и истомишљеница		
	-истомишљеници и истомишљенице		

Karaj gesamideanoj, vi nun bone komprenas.

∴

Будуће време у есперанту је такође просто време, за разлику од нашег. Добија се додавањем наставка -os за сва лица једнине и множине.

mi legos	-ја ћу читати или читаћу
ŝi sendos	-она ће послати или послаће
ni venos	-ми ћемо доћи или доћи ћемо
ili povos	-они (оне, она) ће моћи или моћи ће

∴

Говорили смо већ о обележавању часова. И за датуме се употребљава редни број са одређеним чланом, а иза њега долази предлог de.

La unua (tago) <u>de</u> majo	1. мај
La dudek-naŭa <u>de</u> novembro	29. новембар

Нашем предлогу на (+ четврти падеж) или другом падежу без предлога одговара есперантски предлог je.

<u>je</u> la kvara de julio	-на 4. јули, 4. јула
<u>je</u> la tridek-unua de januaro	-на 31. јануар, 31. јануара

(наставиће се)

Amuzo

Aforismoj


Patro diras ke Granda urso estas en ĉielo. Kaj mi vidis ĝin en Zoo-ĝardeno.

Neniel mi povis progresi en lernejo, ĉar ĝi ne estas entrepreno de mia patro!

Avinjo donacas iom da poŝmono al mia patro, ĉar li estas instruisto en lernejo

Ĉe ni historio komenciĝas kiam nia instruistino eniras la lernoĉambron.

Aforismojn verkis : Mitar Mitrović
Esperantigis: Jadranka Mirić



ŜERCOJ PRI MATEMATIKISTOJ

Risko de bombo en aviadilo

Matematikisto kaj nematematikisto sidis en flughavena halo atendante sian flugveturon. La nematematikisto estis terure timigita, preskaŭ en paniko pro probableco, ke en aviadilo povas esti bombo.

La matematikisto diris: "Ne timu, nur en ĉiu dekmila aviadilo troviĝas bombo."

„Ĉiu dekmila? Sed tio ja estas sufiĉe granda probableco.“

La matematikisto repondis: „Se vi volas malgrandigi la probablecon, tiam vi portu bombon en aviadilon. Probableco, ke en aviadilo troviĝas du bomboj, estas dekmiloble pli malgranda.“

Aĉetante ŝuojn

Matematikisto venis en ŝuvendejon kaj la vendisto plendas, ke li neniam scias kiom da diversakj grandecoj de ŝuoj li devas mendi. La matematikisto diris, ke tio estas tute facile determinebla kaj skribis formulon por la normala distribuo de Gaus. La vendisto rigardis la formulon kaj demandis:

„Kiu litero estas tiu ĉi?“

La matematikisto respondis, ke tio estas greka litero „pi“.

„Kio estas pi?“

„Tio estas proporcio de perimetro kaj radiuso de cirklo.“

„Sed kion havas ŝuoj komunan kun cirklo?“

Matematika leciono

Instruisto de matematiko: „Nun ni supozu ke la nombro de la ŝafoj estas **X**.“

Lernanto: „Sed, sinjoro profesoro, kio okazas, se la nombro de la ŝafoj ne estas **X**?“

Kompilis: Adem Jakupović



La 93-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Roterdamo, Nederlando de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008



La 60-a Kongreso de IFEF okazos en Poznań, Pollando de la 17-a ĝis la 24-a de majo 2008.



La 1-a Kongreso de serbiaj esperantistoj okazos de la 1-a ĝis la 4-a de majo 2008 en Niška Banja